

Bulgara **ESPERANTISTO**



E N H A V O

	Paĝo
Nikola Aleksiev. Antaŭ historia evento	1
Asen Grigorov. Al Zamenhof	3
Prodan Prodanov. Kun kantoj ĉe amikoj	3
J. Toczyski. La 11-a infana kongreseto	6
Prof. S. N. Podkaminer. Lenin kaj Esperanto	7
Ljubomir Dojĉev. Esperanto en la vivo de mia patro	11
Ĵeko Zaprjanov. La aktiveco daŭre kreskas	13
Dimitr Mutuŝev. Memore al Dimĉo Debeljanov	13
Ladislav Ŝpina. Internacia amikeco en la praktiko	14
Ĵivko Kolev. Interesa prelego	14
A. Seljankin. XII Balta Fesperanto-tendaro	15
Pavel Rosa. Esperanto en Slovakio	15
* * * Pola Radio Gdansk disaŭdigas en Esperanto	16
E. Kiselev. Esperanto-novaĵoj el USSR	16
* * * La plej bela birdido	17
Ljubomir Miĥajlov. „Scienca revuo“ dudekjara	17
* * * Letero de Esperantista Muzik-Ensemblo „Muzilo“ . . .	18

Sur la kovrilpaĝo:

La partoprenantoj en la Konferenco de la Distrikta Komitato de
BEA—Ĥaskovo (vidu p. 13)

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando—2 lv.,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero—0,14 lv.
Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 90 lv.; korespond.
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Përintetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Fsp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesfo 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija, D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**ANTAŬ HISTORIA EVENTO**

Estas fiksita la dato de la Deko Kongreso de Bulgara Komunista Partio. Pro la graveco de la tagordo oni povas taksi tiun kongreson kiel historian eventon en la vivo de nia lando. La delegitoj pristudos kaj aprobas la programon de la Partio por la finkonstruo de alte evoluanta socialisma socio, por la kreado de la materialaj kaj spiritaĵaj premisoj de laŭgrada transiro al komunismo. Tiu programo ĝeneraligos nian ĝisnunan sperton, ĝi skizos la perspektivojn kaj la tendencojn, la ĉefajn vojojn kaj rimedojn por la evoluado de nia socio dum la sekvantaj 25—30 jaroj.

Tiu nova programo estas programo por paca krea laboro, por pli rapida disvolviĝo de nia lando, ĝi prezentas intereson ne nur por la vivantaj generacioj de nia popolo, sed ankaŭ por la estontaj. Kion la popolo efektigos dum la sekvantaj tri jardekoj ĝis la fino de la XX jarcento, tio estas la reala bazo por la vivo de la generacioj en la komencaj jardekoj de la XXI jarcento. Ĉiu pensanta homo povas prezenti al si la perspektivecon kaj la gravecon de simila programo.

Al tio oni devas aldoni ankaŭ la signifon de la nova programo por la interrilatoj de nia lando kun ĉiuj ceteraj landoj. Ja sukcese evoluanta lando, strebanta al la suproj de la monda ekonomio kaj kulturo, preparas la premisojn por fruktodona paca kunlaborado kun dekoj da landoj en la tuta mondo sur ĉiuj terenoj — ekonomia, politika, socia, kultura.

Krom tio la Deko Kongreso akceptos projekton de nova konstitucio de PR Bulgario, submetota poste al tutpopola diskutado antaŭ ĝia definitiva voĉdonado en la Parlamento.

La Deko Kongreso aprobas ankaŭ la direktivojn por la sesa kvinjara plano de la soci-ekonomia disvolviĝo de PR Bulgario (1971—1975) sur la bazo de rapide evoluigata scienc-teknika revolucio.

La tuteca politiko de la Partio kaj la Popola Registaro estas subigita al la interesoj de la ordinara homo, por ĝia materiala bonstato kaj spirita kresko, por la ĉiufanka suprenleviĝo de la socialisma socio.

Gvidprincipo de la ekstera politiko de Bulgario estas la certigo de paco, ĉiam pli bonaj cirkonstancoj por la konstruado de la socialismo kaj komunismo en nia lando. Por tiu celo ni helpas al la realigado de la principo de paca kunekzistado inter ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj en la mondo.

Ni konsekvence batalas kontraŭ la imperiismo, la reakcio kaj la agreso, por stabiligo de la paco en la mondo, por savi la homaron de la minaco de nova mondmilito.

En la nomo de tiu programo la bulgara popolo denove manifestos

sian plenan aprobon al la antaŭstaranta Kongreso, atendante de ĝiaj decidoj sian ankoraŭ pli helan estontecon. En la fabrikoj kaj uzinoj, en kooperativaj farmoj, en lernejoj kaj institutoj, en kulturaj kaj sociaj organizaĵoj oni komencis la organizadon de speciala laborkonkurado por atingi novajn ŝtupojn en la sukcesa realigo de la partia politiko.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, sendepende kie ni laboras, oficas aŭ studas, junaj kaj maljunaj, ankau donos nian laŭfortan kontribuon por la bonkvalita plenumo de niaj kongresaj taskoj en la tutpopola konkurado. Ni scias, ke ĉiuj bonintencaj kaj pacamaj homoj en la mondo aprobas la pacan strebadon de nia popolo al pli feliĉa vivo. Ni ja ne minacas kiun ajn alian popolon, ni ekspluatas nek unu fremdulon, ni simple organizas niajn fortojn por krei al ni pli indan por la homo de la XX jarcento vivmanieron. Ni ne envias al tiuj popoloj, kiuj atingis por si pli altan vivnivelon, sed ni lernas el ilia sperto kaj faras la necesajn laborojn por bonaranĝi nian propran domon. Tio ne nur ne tuŝas la interesojn de la ceteraj popoloj, sed eĉ prezentas imitindan ekzemplon en la intereso de paca kunvivado kaj aktiva kunlaborado de ĉiuj popoloj. Ni, la bulgaraj esperantistoj, ricevis en la kondiĉoj de PR Bulgario larĝajn eblecojn agadi por la sukcesa disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto kaj por ĝia aplikado en la intereso de la paco kaj interkompreniĝo de la popoloj.

Ni ankau porestante konigos la veron pri la celoj kaj streboj de la bulgara popolo, gvidata de la Komunista Partio al pli alta materiala kaj spirita bonstato. Ni uzos niajn korespondajn ligojn por sciigi al niaj eksterlandaj amikoj gravajn antaŭstarantajn eventojn. Ni informos ilin, ke ĝis nun nek unu alia partio aŭ reĝimo faris por la popolo tiom multe, kiel la Bulgara Komunista Partio. Kaj ni povas krei nian estontecon nur sub la gvido de tiu kuraĝa, hardita kaj elprovita gvidanto de nia lando kaj popolo. Kiu interesiĝas pri nia vivo kaj laboro, pri niaj ĝisnunaj kaj estontaj sukcesoj, tiu devas konatiĝi kun la motoro kaj organizanto de ĉiuj niaj atingajoj — la Bulgara Komunista Partio. Ni, la bulgaraj esperantistoj, sendepende ĉu partianoj aŭ ne, rekonas la gvidrolon de la Partio en ĉiuj sferoj de la vivo. Jen pro kio ni kun intereso atendas la novajn epokfarajn decidojn de la X Partia Kongreso. Kaj ni laboros plenforte por la sukcesa plenumado de la speciala kongresa konkurado, kiu komenciĝis laŭ iniciato de dek sofiaj entreprenoj kaj disvastiĝas tra la tuta lando.

Aparte ni, la bulgaraj esperantistoj, devas memori, ke unu jaron post la Partia Kongreso okazos la 38-a Esperanto-Kongreso. Por ĝi ni devas prepari nin frue. Ni ne devas perdi tempon. Ĉiu monato kaj tago jam estas ege bezonataj por renkonti la kongrestagojn kun novaj sukcesoj en ĉiuj sferoj de la Esperanto-agado: organiza kaj kultura vivo, sukcesa kursa laboro, socia kaj porpaca agado en kunlaboro kun ceteraj amasaj organizaĵoj, regionaj renkontiĝoj de esperantistaj societoj kaj distriktaj komitatoj de BEA por komune ekskursi, kanti, distriĝi, viziti famajn lokojn, interŝanĝi ĉiufankajn spertojn. Ni akurate kolektados la membrokotizojn kaj abonpagojn por „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ kaj plenumos multajn Esperantajn taskojn. Tiamaniere ni levos pli altan la prestiĝon de nia landa Esperanto-movado kaj gajnos novajn amikojn en la vicoj de la tutmonda esperantistaro. Ja niaj personaj amikoj estas amikoj ankau de nia popolo.

Do, al streĉa kaj fruktodona laboro por inda renkonto de la X-a Kongreso de BKP, por brilega estonteco de nia brava popolo, por triumfo de la paco en la tuta mondo!



AL ZAMENHOF

Sento mia,
ŝprucu el la koro,
eksonoru
en ĉi tiu strof'!
Pri la Majstro kara
rememoru,
kantu nun
pri Zamenhof!

Vi aŭguru pri serena helo,
pri printempa
viviganta blov',
lumu forte per la verda stelo
ĉe la kor' de Zamenhof!

Okaze de la 111-a datreveno de lia naskiĝo
Kriu vi proteste,
koro mia,
kontraŭ la krimegoj de l' bandit'
en la frata lando vjetnamia,
kontraŭ murdoj
kaj milit'!

Flugu alte,
mia sento kora,
iru laŭ la Zamenhofa voj'!
Luktu por la estonteco flora,
por la vivo,
por la homa ĝoj'!

Asen Grigorov

KUN KANTOJ ĈE AMIKOJ

Raportaĵo de *Prodan Prodanov*

(Daŭrigo el № 10)

En Tallinn mi sukcesis viziti Hilda Dresen. Ŝi loĝas en lignodomo, karakteriza por la baltaj kaj skandinaviaj landoj. Ĝi troviĝas en la urba centro, sed interese: la loko estas tute senbrua. Vera trezoro de la loĝeja korto estas negranda florgardeno. Diversaj printempaj floroj abundis en ĝi.

Strangaj sentoj konfuzis min. Mi sentis min kiel gimnazion antaŭ ekzameno. . . En la hotela ĉambro mi eĉ parkerumis kelke da bonstilaj frazoj. Dumvoje tamen ili vaporigis. Jen, mi staras antaŭ la pordo kaj fingropremas la sonorilan butonon. . .

La aperinta virino, kiun mi alparolis esperantlingve, evidentigis la bofratino de Hilda Dresen. Post iom da tempo venis la vera Dresen kaj invitis min. Ŝia modesta ĉambro posedas preskaŭ spartanan komforton: seĝolulilo, sofo, skribotablo kun tajpmaŝino supre kaj bretaroj kun libroj. De la muro pendas la portreto de Zamenhof kaj fotografaĵoj de aliaj Esperantaj aktivuloj. La verdstelaj emblemoj aldonas al la ĉambro aspekton de Esperanta agitpunkto, ĝenerale ĉio parolas

pri vivo, entute dediĉita al Esperanto.

Komence nia konversacio iris stagne. Anstataŭ paroli mi kriis, ĉar antaŭ mia forveturo al Estonio, en Sofio mi suferis katastrofon. . . Rezulte de tio mi sentis mian kapon kiel fremdan kaj mi aŭdis malfacile.

— Inter miaj vizitantoj vi estas la dua bulgaro, kiu aŭdas malbone — diris Hilda Dresen protektoafable.

— Kaj kiu estis la unua? — mi interesiĝis.

Dresen alportis fotoalbumon. En la portreto de la juna viro kun riĉa krispa hararo mi apenaŭ rekonis Todor Lazarov. Kiam mi estis gimnaziano en Ŝumen, Lazarov estis mia kuratoro-zorganto. La alia junulo estis Mihail Ŝerĝiev — La Sukero. . . La belulo kun la revema fizionomio kaj longa hararo estis nia elstara Esperanto-poeto Dimitr Zlatarski — Miti, el Dâlgopol, distrikto de Varna. . . Sur serio da fotografaĵoj mi vidis vivĝojan kaj rideteman junan viron en soldata uniformo kun serĝentaj epoletoj. . . Georgi Dimov, la posta docento en la Supera Ekonomia Instituto de Varna,

fama Esperanto-pedaĝogo. Sed kiu estas tiu bonanima junulo, kiu intencas lasi lipharojn por aspekti pli matura? Vane mi penadis lin rekoni. . . Devis helpi al mi la afabla dommastrino: Asen Grigorov!

En la albumo de Hilda Dresen mi vidis parton el la juneco de la nuna bulgara Esperanto-movado. Dank' al tiu albumo la konversacio plivigliĝis. S-anino Dresen regalis min per la kurtima glaso da teo, kaj ĉe la ronda tablo ni longe parolis pri Bulgario, kiun ŝi bone konis, kaj pri la Esperanto-movado ĝenerale. Mi forlasis Hilda Dresen entute ravita de ŝi.

Post nelonga promenado tra la urbo mi revenis en la hotelon. Sur la skribotablo atendis min vizitkarto de Jan Ojalo, Esperanto-aktivulo. Pertelefonan sciigon pri mia ĉeesto li estis ricevinta de H. Dresen. Mi tuj telefonis al li. Sekvontan vesperon mi gastis en lia domo. Ojalo estas tre energia homo kun vigla menso kaj perfekta espe-

rantisto. Lia edzino ankaŭ parolas Esperanton. Eĉ lia filo, kiu, kiel ĉiu junulo, forestis pro la blankaj noktoj. . . Mi neniam forgesos la agrablan vesperon en la domo de s-ano Jan Ojalo.

Estis la 3-a de junio. Nia unua koncerto en Tartu. Tartu estas la iama estona ĉefurbo. Centro de scienco kaj de kulturo. La urba universitato estas fondita en 1802 kaj ĝia scienca biblioteko estas riĉega — pli ol 2 500 000 da volumoj! Iuj el la libroj datiĝas el la epoko de Gutenberg. En la sama universitato ricevis diplomon la fama ĥirurgio Pirogov.

La koncerto okazis en la universitata aŭlo. Unue, la studenta koruso gratulis nin per „Gaudeamus igitur“. Poste koncertis ni. La publiko de Tartu donis neordinare entuziasman esprimon de sia aprobo. La aplaŭdoj inspiris nin kanti emocie, kun ankoraŭ pli da simpatio kaj amo al tiu ĉi milda publiko. La kanto „Senmortaj“ de nia komponisto Georgi Dimitrov kaŭzis larmojn en multaj okuloj. Tia reago de estonoj, kiuj ne komprenas la bulgaran lingvon, estis por mi stranga. Verŝajne, la senriproĉa plenumo de nia talenta solisto Marin Tokuŝev kontribuis por tio. Aŭ la beleco de tiu ĉi elstara ĥorkanto!

Bulgarlingva gratulo en tiu ĉi malproksima norda regiono estis por ni surprizo neatendita! Ĝin faris profesoro de bulgara lingvo, kiu rememoris al ni pri la estona sango, verŝita por nia liberigo el la turka jugo. . .

Sekvontage post kelkhora promenado tra la belega urbo ni forveturis al Pärnu, rimarkinda baltamara ripozejo. La nekutime bela vetero, leĝeraj ondoj de la maro allogis nin kaj la plimulto el ni preferis la sunradiojn kaj la marbanadon.

La koncerto okazis antaŭ multnombra publiko en granda koncertejo, kaj nia sukceso estis senduba.

La saman vesperon mi renkontis la simpatian kaj ege bonkoran Arnold



Esperantistoj en la ĝardeneto de Hilda Dresen. De dekstre maldekstren: Pr. Prodanov, Ilse Kelts, Hilda Dresen kaj Valter Toomsalu.



Munak, akompanitan de aliaj gesamideanoj. Nia nelonga interparolo pasis en agrabla kaj amika atmosfero. Bedaŭrinde, la tempo ne sufiĉis. Ni devis tuj reveturi al Tallinn.

La plej streĉita momento por ni estis la koncerto en Tallinn. Ni devis kanti antaŭ ĉefurba, postulema kaj kritikema publiko. Ĉi tie estis la muziklito de la lando. Dum la kantado ni strebis doni la maksimumon. Ĉar ni kantis antaŭ homoj, kies landon kaj popolon ni tre estimis kaj ekamis.

La estonan kanton „Sömeralt sain Sörmikule“ ni plenumis kune kun la estonaj amikoj el „Türnpu“ kaj la koncerto transformiĝis en veran feston de la bulgara-estona amikeco. Inter la aŭskultantoj estis ankaŭ samideanoj-esperantistoj, kiel Hilda Dresen, Noore Vahter, familio Ojalo, familio Soikmets el Kohila k. a.

La lasta tago en la ĉarma urbo estis belega, sunplena kaj varma. La junulinoj en siaj maldikaj roboj similis al fejnjoj. La junuloj kun siaj longaj haroj kaj barbetoj aspektis kiel vikingaj princoj. Hazarde surstrate mi renkontis viron, kies verda stelo altiris mian atenton. Li estis Valter Toomsalu, akompanita de sia edzino. Posttagmeze en lia domo mi aŭskultis belegajn E-kantojn el lia diskoteko kaj trarigardis lian numizmatikan kolekcion. Post la kutima te-trinkado ni decidis, ke vizito ĉe Hilda Dresen ne estus superflua.

La korta florgardeno de nia Dresen estas eta filio de la paradizo. . . Ni sidis sur ligna benko kaj babilis pri diversaj aferoj. En la ĝardeneto de la Esperanta eminentulino estis multe da floroj. La miozotoj similis la bluajn okuletojn de la estonaj infanoj, kiuj kreskas en paco sub la varmaj gepatraj zorgoj. La ruĝaj tulipoj kaj la peonioj memorigis pri la ardantaj koroj de tiu ĉi norda popolo. Antaŭ ol disiĝi kun Hilda Dresen mi petis ŝin denove montri al mi la ŝatatan albu-

mon. . . La horo estis 24. Malfrua blanka nokto. „Gusla“ kaj „Türnpu“ kantis kune sur la stacidoma kajo. La vagonaro al Riga atendis nin. Jen — la fervojistoj invitas nin envagoniĝi. La lasta komuna kanto, kompreneble, estis „Sömeralt sain Sörmikule“. La trajno ekmoviĝis kaj forveturigis nin. . . Malproksime de ni restis niaj karaj estonoj kaj la pitoreska silueto de Toompea. Mateniĝo en Riga, alia gemo de la baltamara koliero.

Nia bonsukcesa koncerto estis disaŭdigita pere de Letona Televido. Junaj knabinoj, vestitaj en brilaj naciaj kostumoj, alportis florojn post la plenumo de ĉiu el niaj kantoj. La publiko estis kontenta. Ni ankaŭ.

Dum la amika vespermanĝo juna muzikisto demonstris virtuozece violonĉelan ludon. Kaj ni, la amikoj el la du ĥoroj, kantis ĝis malfrue.

En Riga mi devis eltrovi Jevsejeva. Ŝi loĝas en la antikva parto de la urbo, sur belega strato. Bedaŭrinde Jevsejeva forestis de la urbo.

Post trinokta kaj dutaga restado en la letonia ĉefurbo ni envagoniĝis en la trajnon al Moskvo. La sunplena tago estis varma. Tiukaŭze Aruids Nejlans, estrarano de „Dziedzonis“, diris: „Tiu ĉi suno ne estas baltika! Ĝi estas bulgara suno — kaj vi alportis ĝin!“

Denove unutaga restado en Moskvo kaj novaj impresoj. . . Tritaga gastado en Kiev — celpunkto de novaj turistaj interesoj. Nin faciligis organizita aŭtobusa ekskurso por trarigardo de la urbo, droninta en verdaĵo de parkoj kaj ĝardenoj. Gvidantino, kiu bone parolis bulgaran lingvon, klarigis al ni ĉion, kio nin interesis. Ni vidis multe da monumentoj kaj rimarkindaj objektoj. Multaj aliaj restis neviditaj de ni. La ukrainoj estas bonegaj akompanantoj. Sinceraj, bonkoraj, ege komplezemaj.

Post dutaga kaj ununokta veturado ni revenis en nian Patrujon, forportinte en la koroj karajn, eternajn memorojn pri niaj nordaj E-amikoj kaj fratoj.



Unu el la plej gravaj kongresaj aranĝoj

LA 11-A INFANA KONGRESETO

Oni devas ĉiam multe bedaŭri, se dum la UK la organizantoj ne sukcesas aranĝi la infankongreseton, kiu tutcerte devas esti traktata kiel unu el la plej gravaj kongresaj aranĝoj.

La 11-a Kongreseto de Esperanto-parolantaj infanoj en Hördiwald, antaŭurbo de Vieno, estis sukcesa kaj vere gratulinda entrepreno de homoj, kiuj oferis por ĝi multege da forto, kaj kies laboro apogis sin sur evidenta amo al infanoj kaj kompreno de graveco de sia agado.

La ejo estis bone elektita. La Internacia Junulara Domo disponigis por la junaj gastoj unu domon kun dultaj ĉambroj. Krom tio la Kongreseto havis je sia dispoŝo manĝejon, ludoĉambron, naĝejon, terason kaj ludejon en apuda parko.

La aranĝon partoprenis entute 39 infanoj (20 knabinoj kaj 19 knaboj) 8—14-jaraj el 12 landoj (Aŭstrujo 5, Britujo 4, Bulgarujo 2, Danlando 2, Francujo 5, GER 3, Hungarujo 2, Italujo 3, Jugoslavio 7, Nederlando 3, Norvegujo 2, Svisujo 1).

La lingva nivelo de la infanoj estis sufiĉe alta. Ili ludis, babilis, kvereletis kaj disputis nur en Esperanto. La granda malsameco de la lingvoj de la partoprenantaro garantiis sendube

la neceson de nura utiligado de la Internacia Lingvo.

La infanoj post kelkaj tagoj amikiĝis; ili loĝis po du el malsamaj landoj kaj malparencaj lingvoj. Ĉiu ricevis notkajeron, en kiu oni devis ĉiutage noti en la Internacia Lingvo la plej gravajn okazaĵojn de la tago kaj fari desegnaĵojn.

La infanoj vizitis la Prater-ĝardenon, manĝis ĉokoladaĵojn kaj kukojn ĉe la urbestra porinfana akcepto, admirante la grandiozan belecon de la urbodomaj salonoj. Ili lernis dum plena semajno novajn kantojn, flutludis, akordeonis kaj tamburis — preparis eĉ interesan kaj amuzan teatraĵon por la gastoj, montrante ĉiam ĝentilan obeemon, disciplinon kaj bonedukitan sintenon. La vizaĝetoj de la infanoj estis gajaj, radiis de ili kontenteco kaj ĝuo.

La ideo lanĉita antaŭ 14 jaroj, dum la Kongreso en Kopenhago (1956), nun donas belegan rikolton. *Ŝajnas, ke al interesigantoj, al homoj pensantaj pri internaciaj kontaktoj de infanoj, pri edukado al internacia solidareco kaj reciproka komprenemo, oni devas nepre montri la jam malfermitan, bone spertitan kaj celtrafan vojon.*

La ĉefedukistino de la Kongreseto s-ino M. Marischler substrekis, ke la infanoj *devas regi bone ne tro ampleksan, sed sufiĉan kvanton da vortoj en Esperanto*, kaj estus tre utile, se „iu“ eldonus „Kongreset-libron“. Ĉi devas esti riĉe kaj nepre kolore ilustrita, enhavanta ĉiujn necesajn esprimojn, la plej ŝatajn, facile kaj rapide memoreblajn kantojn, versaĵojn kaj diraĵojn, priskribon de interesaj ludoj ktp., enhavanta lokon por notaĵoj, rimarkoj kaj desegnaĵoj.

Tian libreton ĉiu kongresonto devus antaŭ la forvojaĝo trastudi kaj bone ekkoni, kaj certe tio ege faciligus lian restadon en la kongreseto.

La Kongreseto estis zorge aranĝita kaj preparita de profesoro Josef Wesian el Graz, kaj poste gvidata de diverslandaj geedukistoj: s-inoj M. Marischler (Aŭstrujo), S. Salamon (Jugoslavio), f-ino B. Koopmans (Nederl.) kaj s-ro J. Henstmengel (Ned.).

J. Toczyski, Pollando

Unu el la du bulgaraj infanoj, kiuj ĉi-jare partoprenis la 11-an Infankongreseton en Vieno estas Ĵorĵeta Miŝo Zdraveva el Sofio, 13-jara.

Graz, 10. 9. 1970

Mi tre ĝojis pro via letero. Mi revenis antaŭ du tagoj el Hispanujo kaj tuj skribas al vi.

Vi bone prezentis vian landon en Vieno, ĉar vi estas tre aminda knabino, kiu krome tre bone parolas Esperanton.

Kiam mi venos al Bul orio, mi vizitos vin, sed tio verŝajne ne okazos antaŭ ol du jaroj. Intertempe vi certe kelkfoje skribos kaj mi espereble ne forgesos akurate respondi. Transdonu saluton al viaj gepatroj kaj geamikoj en lernejo.

Josef Vesian

Jen la teksto de bildkarto, kiun ŝi ricevis de s-ano Josef Vesian el Graz, gvidanto de la Kongreseto:

Kara Ĵorĵeta,

Profesoro S. N. Podkaminer, eminenta soveta esperantisto, senpasie kaj sobre analizas la realajn faktojn kaj komparas ilin kun la legendoj, kiuj helpe de kelkaj esperantistaj

1. Enkonduko

Dum multaj jaroj en esperantista gazetaro estas pridiskutata la rilato de Lenin al Esperanto. Nuntempe okaze de la jubilea datreveno de la 100-jaro de la Lenin-naskiĝo tiu ĉi diskutado plioftiĝas. Kaj tiu ĉi fakto estas komprenebla: eĉ kontraŭuloj de Lenin estas devigataj agnoski, ke li estis unu el la plej grandaj revoluciuloj kaj pensuloj de ĉiuj epokoj. Estas klare, ke aprobo aŭ malaprobo de Esperanto flanke de Lenin havus tre gravan signifon por la evoluo de la esperantista movado en la socialismaj landoj kaj unuavice en Sovet-Unio mem.

Estas notinde, ke la aŭtoroj, kiuj okupas sin pri tiu ĉi temo, staras sur du absolute malsamaj pozicioj: unuj asertas, ke *Lenin estis konvinkita kontraŭulo de Esperanto, aliaj, ke Lenin estis fervora adepto de Esperanto*. Kaj kelkuj kategorie insistas, ke *Lenin estis esperantisto* kaj eĉ prelegis esperantlingve dum iuj gravaj kunvenoj.

Kaj kion diras la plej fidindaj atestantoj — la faktoj kaj dokumentoj? En la moskva instituto de Marx-Engels-Lenin (IMEL), la plej grava marksisma-leninisma sciencesplora institucio, estas zorge kolektataj, studataj kaj publikigataj ne nur ĉiuj verkoj, paroladoj, eldiroj de Lenin, sed eĉ la plej malgrandaj liaj notoj kaj skribaĵoj. Forestas iu dubo, ke, se Lenin ie kaj iam estus espriminta, ĉu buŝe, ĉu skribe, sian opinion pri Esperanto, ĉu pozitive, ĉu negative, la postsignoj, se ne precizaj atestaĵoj de tiuj eldiroj, troviĝus

gazetoj bedaŭrinde forte enradikiĝis. Ni esperas, ke ĉi-suba analizo nun finfine fortiros la bazon por multaj nefidindaj kaj kontraŭdiraj „remomoroj“, supozoj kaj asertoj. La Red. de „D.E.“

en la Instituto. Dum la lastaj 6 jaroj la Instituto trifoje respondis pri tiu ĉi temo al leteroj, senditaj de sovetiaj kaj eksterlandaj esperantistoj. La lasta respondo estis sendita en la jaro 1968 al la esperantistoj de GDR. En ĉiuj tri respondoj estas substrekite, ke en la Instituto forestas iu ajn eldiro de Lenin rilate Esperanton. Samtempe la Instituto agnoskas la ekziston de multaj memorverkoj, kiuj enhavas tute malsamajn asertojn: iuj el ili emfazas simpation de Lenin al Esperanto, aliaj karakterizas la rilaton de Lenin al Esperanto kiel negativa. Ni analizu kelkajn el tiuj asertoj, komencante per la negativaj.

2. Lenin — kontraŭulo de Esperanto?

Dum la lastaj jaroj en la soveta gazetaro aperis kelkaj artikoloj, kies aŭtoroj kategorie deklaras, ke Lenin estis kontraŭulo de Esperanto. La unua artikolo aperis en la jaro 1957 en la revuo „Junulara gazetaro“ (№ 8—9). Ĝi estas malkompetenta kaj nedokumentita „verko“ de iu O. Lognova, en kiu ŝi, ne kaŝante sian malestimmon rilate Esperanton, citas artikolon de E. Didrikil, kiu laŭ ŝia aserto ĉeestis en la jaro 1913 en Bern (Svislando) prelegon de Lenin, dediĉitan al la nacia problemaro. Didrikil asertas, ke Lenin, tuŝante la problemon pri la lingvo de la estonta socio, diris: „La revoj pri artefarita unusola internacia lingvo, pri iu „Esperanto“ aŭ „Volapük“, estas utopio. Ne artefarita estos la lingvo de la venonta socio. La problemo de la lingvo estas solvebla duvoje: aŭ unu el la lingvoj de la grandaj kulturaj nacioj, la angla, germana, franca, eble an-

* Ni represas ĉi-artikolon el la organo de la esperantistoj en GDR „Der Esperantist“, № 42/1970.

*kaj la rusa, fariĝos komuna lingvo por ĉiuj popoloj, aŭ ĉiuj popoloj ekposedos 3—4 lingvojn kajuzos ilin.*¹

Ni supozu por unu momento, ke Didrikil ĝuste rememoris la vortojn de Lenin. Tio signifus, ke Lenin ne kredis, ke Esperanto estos unusola lingvo de la unuigita homaro en la socio de la estonto. Sed la esperantistoj, komence de la Bulonja Deklaracio (1905) kaj ĝis nun, neniam proponis Esperanton kiel unusolan lingvon, sed nur kiel lingvon duan por ĉiu. Sekve oni ne povas konsideri la cititan frazon de Lenin (se ĝi estus eldirita) kiel neon de la rolo de Esperanto kiel moderna internacia lingvo, ilo de interkompreno de diverslingvaj popoloj.

Tamen Didrikil diris malveron kaj elpensis la vortojn de Lenin. En la jaroj 1912—1914 Lenin loĝis en Krakov kaj Poronino (Pollando) kaj multe laboris por la nacia problemo, ofte tuŝante la lingvan demandon. De tiu ĉi periodo postrestis multaj materialoj kaj tezoj de la prelegoj, referaĵoj, kritikaj notoj ktp.

Tiuj ĉi materialoj pri naciaj problemoj, inkluzive la lingvaj, estas eldonitaj de IMEL en la XVII-a kaj XXX-a volumoj de „*Lenina artikolaro*“. En la enkonduko al la XXX-a volumo la redakcio notas: „... la dokumentoj de la XVII-a kaj XXX-a volumoj permesas kun senmanka kompleteco respeguli la enhavon de 4 paroladoj de Vladimir Iliĉ pri la nacia problemo en la jaroj senpere antaŭintaj la militon“² (Sekve, inkluzive la Lenin-prelegon en Bern en la jaro 1913, pri kiu skribas Didrikil — S. P.). En ambaŭ volumoj oni ne trovas eĉ mencion pri Esperanto. Sed rusa proverbo diras: „Ne estas fumo sen fajro.“ Tial estas interese esplori, kion tiutempe

diris aŭ skribis Lenin, se ne pri Esperanto, do eble pri iuj apudaj problemoj.

En la plena verkaro de Lenin nur unufoje estas menciita la problemo de la tutmonda lingvo. En la tezoj, verkitaj de Lenin en la jaro 1914, estas skribite: „*La tutmonda lingvo eble estos la angla, sed eble + la rusa.*“³

La saman frazon ni renkontas ĉe Lenin ankoraŭ en alia materialo. En la XXX-a volumo de „*Lenina artikolaro*“ estas presite: „*Nacia problemo (Tezoj laŭ memoro)*“. La redakcio aldonas jenan piednoton: „*Tezoj de Lenin „Nacia problemo“ estis skribitaj de li, evidente, post lia referato en Parizo la 23-an de januaro 1914.*“⁴

En tiuj ĉi tezoj Lenin, analizante la procezon de disvastiĝo de la angla, franca kaj germana lingvoj, substrekas la eliminon de unuj lingvoj per la aliaj, indikas jenajn ciferojn, montrantaj kiom da milionoj da homoj posedas la menciitajn tri lingvojn kaj kiel tiuj ĉi kvantoj kreskas dum la periodo 1800—1900.

Ni citu Lenin:

„Ekzemplo:“		elimino	
jaro	angla	franca	germana
1800	20	30	30 (= 80).
1900	125	40	70 (= 235).

(*tutmonda lingvo eble estos la angla, sed eble + la rusa*)⁵

Sed nun la aŭtoro aŭdas protestvoĉon de iu severa leganto: „Vi volas kondamni Didrikil pro falsigo de la historio, tamen vi skribas pri la referato de Lenin, legita en Parizo en la jaro 1914, kaj Didrikil mencias pri la referato, kiun li aŭskultis en Bern, en la jaro 1913!“. Jes, la aŭtoro skribas

¹ Revuo „*Juna gvardio*“, № 2—3, pĝ. 62, 1924.

² „*Leninskij subornik*“, vol. XXX, pĝ. 3, rusa eldono, 1957.

³ V. I. Lenin, *Plena Verkaro*, rusa 5-a eldono, vol. 24. pĝ. 38.

⁴ „*Leninskij sbornik*“, vol. XXX pĝ. 61—71, 3-a rusa eldono, 1957.

⁵ Samloke, pĝ. 64.



pri la referato, legita en la jaro 1914 en Parizo, ĉar *nur tie kaj nur tiam* Lenin diris ion, se ne pri Esperanto, do almenaŭ pri la lingvo tutmonda. Nun ni transiru al la jaro 1913 kaj al Bern.

Sed antaŭ ol transiri al tiu ĉi fakto, estas necese emfazi la atentindan modestecon, kun kiu Lenin esprimis sian penson pri la tutmonda lingvo de la unuigita homaro, substrekte en unu linio dufoje per la vorto „eble“ la necertecon de la konsiderata solvovojo. Kaj nun pri Bern.

En la jam kelkfoje menciita XXX-a volumo de „Lenina artikolaro“ sur la paĝoj 42—45 estas publikigitaj la Leninaj „Planoj de referato pri nacia problemo. Julio 1913. Bern.“

En la komentariaj piednotoj de la redakcio (paĝo 45) ni ekscias, ke en la unuaj tagoj de julio 1913 Lenin alveturis en Svislandon, en Bern. La 9-an de julio li prelegis pri la nacia problemo en Zürich, la 10-an en Ĝenevo kaj la 13-an en Bern. Neniu alia prelego de Lenin okazis en Bern en la jaro 1913.

Sekve, temas pri tiu ĉi referato, kiun aŭskultis Didrikil. Lingvaj problemoj okupas en tiu ĉi referato relative modestan lokon. Lenin mencias la problemon de la popola lingvo kaj de la latina. Poste li tuŝas la demandon de Svislando kaj ĝiaj lingvoj respektive de la naciaj kondiĉoj. Fine Lenin primokas provojn revivigi la provenĉalan lingvon en Francio kaj la lingvaĵon „Plattdeutsch“ en Germanio, nomante tiujn ĉi provojn „strangaĵoj“. Neniu vorto ne nur pri Esperanto, sed eĉ pri la tutmonda lingvo!

Sekve evidentiĝas, ke kiam Didrikil aŭskultis Lenin en 1913 en Bern, li tute ne tuŝis la problemon de la tutmonda lingvo, des malpli Esperanton. Kaj kiam Lenin parolis pri la tutmonda lingvo, en Parizo en la jaro 1914, Didrikil ne ĉeestis la referaton. (Li eĉ ne per unu vorto mencias tion).

Ni povas fari kelkajn konkludojn:

1. *Ne ekzistas iu ajn pruvo, ke Lenin en la jaroj 1913 kaj 1914 esprimis iun negativan opinion kontraŭ Esperanto, kiel internacia lingvo, la dua por ĉiu homo;*
2. *En la jaro 1914 Lenin esprimis opinion ne kategorian, ke la rolon de la tutmonda, sola lingvo de la estonta socio povos eble ludi la angla lingvo aŭ sole aŭ kune kun la rusa lingvo;*
3. *Eĉ tiun lastan opinion Didrikil ne povis aŭdi, sed nur legi pri ĝi.*
4. *Tial la citaĵo, atribuita de Didrikil al Lenin rilate Esperanton, estas sendube falsaĵo, eble bazita sur eraro de Didrikil mem, kiu miksis Bern kaj Parizon, la jaron 1913 kaj 1914, Leninan eldiron pri la tutmonda lingvo kaj siajn proprajn kontraŭesperantistajn ideojn. Aŭ eblas, ke ĝi ne estas eraro, sed konscia falsigo de la faktoj kaj tiel por spekulaciante per la nomo de Lenin, malhelpi la progreson de la Esperantomovado, kiun Didrikil malsimpatias.*

Tamen tiu ĉi falsaĵo fariĝis la ĉefa fonto, el kiu ĉerpas siajn „argumentojn“ la kontraŭuloj de Esperanto. Krom la jam supre menciita artikolo de O. Loginova, en la jaro 1964 aperis ankoraŭ du artikoloj, bedaŭrinde en seriozaj sovetaĵaj revuoj, kies aŭtoroj, bazante sin je la „faktoj“, sciigitaj de Didrikil, kategorie asertis la negativan rilaton de Lenin al Esperanto. La unua el tiuj ĉi artikoloj apartenas al F. V. Tadevosjan. (*Problemoj de la historio de KPSU* № 4/1964). La aŭtoro, tuŝante interalie la problemon de Esperanto, ripetas la vortojn de Didrikil. La dua artikolo estis skribita de antaŭ nelonge mortinta fama kontraŭulo de Esperanto, profesoro M. Kammari. La tuta artikolo, aperigita en la revuo „Komunisto de Estonio“

(№ 7/1964, pĝ. 66—71) estis plena de malĝustaĵoj, kripligoj, arbitraj konkludoj kaj simple elpensaĵoj rilate Esperanton kaj la esperantistojn.

La kritiko de tiu ĉi „verko“ estas ekster la kadroj de tiu ĉi artikolo. Sed necesas emfazi, ke Kammari, citante la asertojn de Didrikil, aldonas: „*Ĉe mi persone tiuj ĉi rememoraĵoj kaj la ĝusteco de la interpreto de la menciitaj eldiroj de Lenin ne elvokas kaj ne povas elvoki iujn ajn dubojn. . .*“ (!? S. P.) Tamen, dezirante plifortigi la impreson de la Didrikil-falsaĵoj, Kammari aldonas alian citaĵon de Lenin. Kritikante la verkon de Kaŭtski kontraŭ Baŭer pro malklara, nemarksista terminologio, Lenin skribas: „*Por kio necesas anstataŭ tio, iu abrakadabro, iu nova Volapük*“.⁶

„Jen kiel rilatis Lenin al Volapük, do al artefarita lingvo!“ — triumfe ekkrias Kammari. Oni povas nur levi la ŝultrojn pro tiuspeca artifiko, maldeca por serioza sciencisto! Ĉiu pli malpli klera homo scias, ke post la malsukceso de Volapük aperis multaj diversformaj mokesprimoj. La vorto Volapük mem ĉesis esti nur la propra nomo de la lingvo, sed transformiĝis ankaŭ je la nomo komuna, sinonimo de iu abrakadabro, sensencaĵo. Hungara komponisto Kalman nomis heroon de unu el siaj operetoj ridindan kaj malsaĝan princon Volapük. Estas tute klare, ke Lenin uzis tiun ĉi vorton, ne pensante pri la internacia lingvo, sed simple karakterizante la pezan, malkompreneblan terminologion de Kaŭtski. Malfacilan taskon havas, evidente, kontraŭuloj de Esperanto, se ili devas apliki similajn metodojn por kritiko de la lingvo.

Multe pli prava estas la atesto de la *fratino de Lenin, M. I. Uljanova*, kiu en artikolo skribita en la jaro

1928, notis, ke Lenin kelkfoje esprimis malfavoran opinion pri Esperanto, nomante ĝin tro artefarita, simpligita, malviva.⁷

Bedaŭrinde M. I. Uljanova ne skribis kiam kaj kielokaze Lenin esprimis tiun ĉi opinion. Sed estas sendube, ke temis pri la ebla rolo de Esperanto, funkcionta kiel tutmonda kaj sola lingvo de la homaro en la estonta socio. Alie oni tute ne povas kompreni vicon da faktoj, montrantaj pozitivan rilaton de Lenin al Esperanto kiel internacia moderna lingvo kaj al la sovetia Esperanto-movado. Pri tiuj ĉi faktoj estos skribite pli sube.

La edzino de Lenin, *N. K. Krupskaja*, kvankam tute nenion skribinta pri la rilato de Lenin al Esperanto, tamen mem esprimis malfavoran opinion pri iu artefarita lingvo ĝenerale. Laŭ sia vidpunkto artefarita lingvo ĉiam estos malriĉa, malviva, malvarma kaj mizera. Tamen ŝi ne neis, ke Esperanto povas esti utila por la interhomaj ligoj, sed ne povis imagi, ke juna homo diros amvortojn en Esperanto al sia amatino kaj ke patrino kantos esperantlingve lulkanton al sia infano.⁸

Al tiu ĉi ne tute malfavora rilato de N. K. Krupskaja al Esperanto estas interese aldoni sekvantan fakton.

En la fino de la pasinta jaro la eldonejo de la Centra Komitato de la tutsovetia komunista junularo „*Juna Gvardio*“ aperigis libron pri korespondado de N. K. Krupskaja kun sovetiaj infanoj dum 1924 ĝis 1939. Por la libro oni elektis la plej interesajn leterojn de la infanoj kaj kelkajn respondojn de Krupskaja. Inter tiuj ĉi leteroj estas unu, skribita en decembro 1928, de infanoj el la urbo Barnaul (Altaja Regiono). La infanoj informis

⁷ „*Raboĉe-krestjanskij Korrespondent*“, („*Laborista-Kamparana Korespondanto*“), № 21, 1928.

⁸ „*Komsomolskaja Pravda*“, 30. I. 1930, pĝ. 3.

⁶ V. I. Lenin, *Plena verkaro*, rusa 5-a eldono, vol. 31, pĝ. 24.



pri sia studado de Esperanto kaj korespondado per Esperanto kun germanaj infanoj. Al tiu ĉi letero la redakcio donis jenan atentindan rimarkon piednotan:

„La lingvo Esperanto — internacia helplingvo, kreita en 1887. La facileco de Esperanto kaŭzis ĝian konsiderinde grandan disvastiĝon. Ĉe ni Esperanto precipe disvastiĝis post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. En la 20-aj jaroj ĝin lernis multaj pioniroj kaj lernantoj. Ili organizis rondetojn de la lingvo Esperanto. Kun helpo de tiu ĉi lingvo geknaboj korespondis kun pioniroj de aliaj landoj. Altan aprezon

de la Internacia Lingvo Esperanto kiel ligilo por la alproksimiĝo de la popoloj donis A. M. Gorkij.“⁹

Resumante tiun ĉi parton de la artikolo, necesas konkludi en konkordo kun la respondoj de IMEL, ke *for-estas iu ajn bazita atesto, pruvo aŭ dokumento pri negativa rilato de Lenin al Esperanto kiel moderna interpopola komprenilo, lingvo dua por ĉiu.*

(Daŭrigo en № 12)

⁹ „Drug bolŝoj, zabotlivij“ (Amiko granda, zorgema). Korespondado de N. K. Krupskaja kun la pioniroj. Eld. „Juna Gvardio“, 1969, pĝ. 64—65.

Niaj pioniroj

ESPERANTO EN LA VIVO DE MIA PATRO

Mia patro — Dojĉo Kolev, unu el la unuaj bulgaraj esperantistoj, naskiĝis la 10-an de oktobro 1880 j., kaj forpasis la 6-an de septembro 1969 en Sofio je 89 jaraĝo. Naskita en vilaĝo Lejarovo (Djukmen) en distrikto de Jambol, en familio de eta mastro agrikulturisto, li finstudis en Sofio (Knjaĵevo) fervojistan roton en 1904 kaj estis oficigita kiel novico-telegrafisto ĉe la stacidomo de Ŝumen.

„... Dum 1901 j. — skribas mia patro en siaj remomoroj — mi konatiĝis kun la tiam nova Internacia Lingvo Esperanto. Mi aĉetis al mi lernolibron kaj komencis lerni ĝin streĉe kaj serioze. . .“

Dufoje en la semajno — de 18 ĝis 20 horo vespere — li vizitis lecionojn de Esperanto, kiujn instruis „bonaj esperantistoj“ en la galerio de dolĉaĵejo „Roza“ en Sofio. Kiel al militisto, la rotestro majoro Lolov havigis al li specialan bileton por viziti senpage Esperanto-kurson en Sofio.

En la somero de 1902 mia patro praktikis kiel telegrafisto-instrukcianto ĉe la fervojlinio Gorna Orjaĥovica — Veliko Târnovo. . . „Tre ofte — skribas li — mi vizitis Târnovo-n, kie mi konatiĝis kun la lokaj esperantistoj. Târnovanoj tiam estis la unuaj batalantoj por Esperanto kaj parolis la lingvon kiel sian gepatran. . . Mi memoras Petr Jordanov, tiam studento, poste advokato, kun kripla dekstra mano. . . Ĥaralampiev — gimnazia instruisto kaj ankoraŭ dekoj da esperantistoj. Inter ili mi povis (dum mia trimonata praktikado) pro-

gresi multe. Mi komencis fari libere longajn konversaciojn en Esperanto. El la kazerno (en Knjaĵevo) dum tiuj 3—4 jaroj mi ekhavis ligon kun pli ol 7—8 esperantistoj el fremdlando. . . Multajn leterojn, poŝtkartojn, gazetojn k. a. mi sendadis por diversaj ekspozicioj dum kongresoj aŭ por organizado de Esperantaj bibliotekoj. . . En la lernejo (Knjaĵevo) inter miaj samklasanoj en 1902 mi malfermis kursojn de Esperanto. 5—6 personoj fariĝis bonaj esperantistoj. La estro Lolov multe ĝojis al mi pro la sukceso kaj ofte ŝerce demandis min kiel estas nomata en Esperanto tio aŭ alio. Mi respondadis al li. . .“

Jam kiel oficisto en la stacidomo Ŝumen (post la komenco de 1904) mia patro ligiĝis kun la lokaj esperantistoj. . . „Tie ĉi, en Ŝumen, li skribas, — mi konatiĝis kun la oficiro de sapeistaj armeoj Ilija Silvestriev. . . ankaŭ kun Ksenofont Jankov. . . Dimitr Kânĉev, Todorov k. a. Ni malfermis kurson de Esperanto. Silvestriev gvidis la lecionojn kaj ni, la progresintoj, helpis lin. . .“ Oni organizis la unuan Esperanto-societon, kiun nomis „Vekiĝo“.

Pli malfrue, kiel fervojoficisto dum 1906—1920 en stacidomoj Ruse, Târgoviște, Suvorovo, Jambol, mia patro estis seninterrompe en kontakto kun la lokaj esperantistoj, pliriĉigis kaj plivastigis siajn konojn en Esperanto kaj estis unu el ĝiaj fervoraj disvastigantoj, agitatoj kaj propagandantoj.

Jam en Jambol „en 1922—1923 — skribas



laŭvorte mia patro — mi malfermis, helpate de pli junaj esperantistoj, kursojn de Esperanto. Mi faris paroladon pri la lingvo kaj havis grandan sukceson. Tiutempe mi estis proponita de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kiel lektoron. Per ordono de la Ministerio de Klerigo mi estis oficigita lektoro-instruanto en la ses gimnaziaj klasoj por instrui Esperanton nedevige po 2 horoj semajne. Mi havis 45 lernantojn, 30 personoj finis la kurson, el kiuj 6—7 personoj bonege. . . .

Translokita komence de 1927 j. kiel ĉefo de stacidomo Ĉerven Brjag, mia patro malfermis kurson de Esperanto ankaŭ tie, kies lektoro estis li mem.

Post tio li plenumis la oficojn de ĉefo de fervojstacio Brusarci, vicĉefo de vara fervojstacio Sofio, ĉefo de vara fervojstacio Varna, regiona estro ĉe fervojstacio Dupnica (nun Stanke Dimitrov) kaj ekde la 1-a de septembro 1935 pensiuliĝis.

Mi estis atestanto, kiel dum la tuta ĉi periodo mia patro fervore legis Esperanto-literaturon, korespondadis kun fremdlandaj esperantistoj (longan tempon kun iu poŝtoficisto

el urbo Birmingham — Anglio), estis regula abonanto de la revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj de multaj fremdlandaj Esperanto-gazetoj kaj eldonaĵoj. Kelkfoje li estis delegito de Esperanto-kongresoj kaj ĝis sia morto mem ne ĉesis interesiĝi pri sia amata lingvo Esperanto.

Je la fino de siaj rememoroj mia patro ne preterlasas noti — kun videbla kontentiĝo: „... je la naŭa de julio 1965 j., post anticipa interkompreniĝo kun la Esperanto-Societo „Ponto de l'Amikeco“ (la fervojista) en Ruse, mi forveturis tien. . . Mi estis akceptita de k-do Veliko Filipov — prezidanto de la Societo, Vlado Georgiev — eksprezidanto kaj malnova Esperanto-aganto, k. a. La vesperon oni kondukis min en la klubejon de sia Esperanto-Societo, kie oni min prezentis al la junaj esperantistoj. Antaŭ ili mi faris priesperantan paroladon, konatigis ilin kun mia multjara agado kiel esperantisto. La kunvenon malfermis la juna kamaradino Maria Preslavska, bona esperantistino. Oni starigis al mi demandojn.“

La sekvan tagon la esperantistoj de Ruse kondukis mian patron al la rimarkindaĵoj de la urbo. Li vizitis ankaŭ la kulturdomon de la transportaj laboristoj, en kiu faris al li bonegan impreson „la ĉambro-revo“ de la esperantistoj-fervojistoj.

Inter la dokumentoj de mia patro mi malkovris kortuŝan testamenton — „Komisio al miaj genepoj“ (do, mia filino Vanĉa kaj mia filo Rumen) kun dato 2. I. 1962 j. „... Mi estas esperantisto de 1901 j. ĝis nun kaj restos tia ĝis la fino de mia vivo. Mi opinias, ke mi ne estus plenuminta mian devon al vi, se mi ne invitos vin, se mi ne montros al vi la vojon al Esperanto.“

La posedado de Esperanto donas grandiozan utilon. . . Mi alvokas vin lerni la Internacian Lingvon Esperanto, kiu havas la forton de 20—30 fremdaj lingvoj, t. e. tutegale, ke vi scios multajn lingvojn.

Esperanto havas milojn da volumoj de originala kaj traduka literaturo en ĉiuj fakoj de la scienco, literaturo, arto. . . Kiu scias Esperanton, tutegale, ke li scias multajn lingvojn. . . Esperanto estas alta fenestro, tra kiu oni vidas la tutan mondon. . .“

Tutajn 69 jarojn mia patro estis konvinkita esperantisto, nelacigebla Esperanto-pioniro, kiu fieris, ke li posedas tiun ĉi belegan lingvon.

Ljubomir Dojĉev

Abono al „Bulgara Esperantisto“ ankoraŭ ebla!

Se iu ne abonis ĝustatempe nian organon pere de la poŝto, li povas fari tion, sendante tuj 1,40 lv. al: „Bulgara Esperantisto“, bul. Hristo Botev 97, Sofio.



LA AKTIVECO DAŬRE KRESKAS

La konferenco de la DK de BEA en Haskovo, okazinta la 27-an de septembro j. k., pasis ĉe granda aktiveco. La ĉefaj demandoj, kiujn ĝi traktis, estis: a) la organiza stato de la E-societoj en la distrikto kaj de la DK de BEA; b) la nova lernojaro de Esperanto en la distrikto.

En la agadraporto, legita de k-do Georgi Idakiev — prezidanto de DK, oni konstatis, ke la organiza stato de la plimulto el la societoj dum la lastaj du jaroj estis bona. Plej multnombraj kaj bone agantaj societoj estis „Internacia Amikeco“ (Dimitrovgrad), „Asen Zlatarov“ (Haskovo), „Trakia Lumo“ (Marica) k. a.

Dum la pasinta 1969/70 lernojaro la 9 societoj en la distrikto organizis 21 E-kursojn, en kiuj lernis la lingvon plej parte gejunuloj kaj lernantoj. Multaj esperantistoj el Haskovo, Dimitrovgrad, Marica, Svilengrad kaj Harmanli subtenas bonajn kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj, rakontas al ili pri la belaĵoj kaj la progreso de nia Patrolando, altiras ilin gaste. Jam venis gastoj el Pollando, Italio, Belgio, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio k. a. Dufoje la esperantistoj el Dimitrovgrad interŝanĝas grupojn kun la interfratiĝinta E-societo en Sirmabeŝennujo (Hungario).

Granda sukceso de la esperantistoj ĉe Societo „Asen Zlatarov“ estis la Festivalo en Haskovo (1969 j.). Bona atingiĝo por la esperantistoj de la distrikto estas la porinstruista kurso en 1970, organizita de la DK de BEA kaj la fako „Popola Instruado“ ĉe Distrikta Popola Soveto.

Malperfektaĵoj laŭ la raporto: neregula kolektado de la membrokoto, malmulta kvanto da abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, nesufiĉa agado in-

ter la gejunuloj, nekontentiga nivelo de lingvoregado fare de multaj esperantistoj, nesufiĉe bona instruado en iuj kursoj k. a.

Sekvis viglaj kaj utilaj diskutoj. Bonajn rekomendojn por forigo de mankoj kaj malperfektaĵoj donis k-do Jordan Jordanov — el la DK de Bulgara Komunista Partio, kiu ĉeestis la konferencon, kaj Jordan Markov — sekretario de la Instruista Sekcio de BEA kaj reprezentanto de CK de BEA.

La konferenco decidis: ĝis la fino de la jaro la membraro de la distrikta E-organizaĵo kresku almenaŭ per 15—20%, dum la nova lernojaro oni malfermu 26 E-kursojn, en kiuj lernu la lingvon pli ol 400 gelernantoj kaj gejunuloj; oni plialtigu la nivelon de la instrulaboro en la kursoj; estu plibonigita la idea-eduka laboro en la societoj; kelkaj postrestintaj societoj plifirmigu sian organizan staton k. a. La esperantistoj en la tuta distrikto variigu kaj intensigu sian ĉiuflankan E-agadon. Ili aktive partoprenu en la ekonomia produktado kaj la kultura vivo de nia socialisma socio por inda renkontiĝo de la antaŭstaranta X Kongreso de la amata Bulgara Komunista Partio.

Jeko Zaprianov

Memore al Dimĉo Debeljanov

Pasis jam 54 jaroj de la morto de unu el la plej amataj, teneraj bulgaraj poetoj — Dimĉo Debeljanov. Ankaŭ lin ne indulgis la milito. . .

La sofiaj esperantistoj rememoris la karan poeton per du kunvenoj — en la Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ kaj la tuturba E-Societo „Maksim Gorkij“. Ambaŭloke bonegan referaĵon tralegis k-do Ivan Draganov. Post ĝi niaj samideanoj recitis versaĵojn el la poezio de Debeljanov.

Pri la celebrado oni informis la muzeon „Dimĉo Debeljanov“ en naskiĝurbo de la poeto Koprivŝtica. La esperantistoj substrekis, ke por ili la poeto estas speciale kara pro la spirito de alta nobleco, humanismo kaj pacamo de lia verkaro.

D. Mutuŝev

Kiam mi partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Helsinko en la jaro 1969, mi interkonatiĝis kun s-no Nano Nancov el Sofio. Eksciinte, ke li estas prezidanto de E-Societo „Maksim Gorkij“, mi tuj proponis interfratiĝon inter niaj kluboj. Ni iomete priparolis la aferon en Helsinko. Post mia reveno hejmen mi ricevis salutleteron de s-no Nanov. Mi tuj respondis kaj denove skribis pri interfratiĝo. Post kelkaj semajnoj mi ricevis invitleteron kaj en la komitato de nia klubo mi estis elektita kiel oficiala reprezentanto de nia klubo viziti Sofion. Mi povas diri, ke mia vojaĝo al Sofio helpis al mi ekoni novajn amikojn ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en Rumanio, kie mi restis pli ol unu tagon. Nekonante rumanan lingvon mi povis pere de nia kara lingvo Esperanto ekhavi bonajn amikojn en Bukureŝto.

Bulgarion mi vizitis unuafoje en mia vivo. Alveturinte Sofion, mi estis tre agrable surprizita: s-no Nanov atendis min en la stacidomo kun malgranda Esperanta flageto

K-ino Vasja Petrova (nia korektistino) kun sia 3-monata filino Iveta.

Ni gralulas al ŝi la grandan feliĉon!



en la mano. Li gastigis min en sia hejmo, kaj mi estis tre kontenta. Dank' al alia mia amiko, Petr Bučavinov, mi vizitis urbon Samokov kaj la proksiman montaran ripozlokon Borovec, kie mi trapasis agrablan vesperon en hotelo „Bor“.

Dum merkreda kunveno de E-Societo „Maksim Gorkij“ mi estis amike akceptita. Granda honoro estis por mi konatiĝi kun la prezidanto de BEA s-no Nikola Aleksiev.

Mi kaj, kompreneble, ĉiuj membroj de la E-klubo en Liberec esperas, ke la kunlaboro de niaj E-kluboj estos fruktodona kaj ke ni tiamaniere kontribuos por la plifirmigo de la amikaj rilatoj inter niaj du popoloj.

Mia restado en Bulgario estis mallonga, sed mi denove konstatis, ke Esperanto helpas malfermi la korojn de ĉiuj homoj.

Fine mi volas danki al s-no Nanov kaj al ĉiuj, kluĵ al mi preparis tre agrablan restadon en Sofio kaj Samokov. Mi pensas, ke ni sukcesos prepari por la prezidanto de E-Societo „Maksim Gorkij“ similan agrablan restadon en nia lando kaj urbo. Ĉiuj ni esperas, ke interfratiĝo de niaj E-kluboj kaj la amikeco inter niaj du popoloj kreskos ĉiam pli kaj pli.

Vivu la ĉeĥoslovaka-bulgara amikeco! Vivu la frateco inter la ĉeĥoslovakaj kaj bulgaraj esperantistoj!

Ladislav ŠPINA,
prezidanto de E-klubo en Liberec —
Ĉeĥoslovakio

INTERESA PRELEGO

La 23-an de oktobro j. k. k-do Bojidar Leonov el Karlovo, prezidanto de STELO kaj membro de CK de BEA, gastis al la esperantistoj de Stara Zagora. En kunveno li parolis tre interese pri la 55-a E-kongreso en Vieno kaj pri la junulara kunveno de STELO en ĝiaj kadroj. La parolado estis ilustrita per bildkartoj kaj diapozitivaj. Aparte grava intereso vekis la sciigo, ke oni fondis ĉe STELO internacian centron pri teknika-sciencia informado kaj dokumentado. La centro helpas la penetradon de Esperanto en la sciencon kaj teknikon.

Post la prelego de k-do Leonov okazis amika vespermanĝo. Nia membraro restis tre kontenta.

Jivko Kolev
prezidanto de E-Societo „Verda Stelo“

En Bukureŝta Politekniko komenciĝis en oktobro j. k. nedevegaj E-kursoj kun 230 gestudentoj. Preskaŭ samtempe estis malfermitaj E-kursoj en la Konstrua Instituto kun 80 gekursanoj.

XII BALTA ESPERANTO—TENDARO

Ĉi-jare la Balta Esperanto-Tendaro okazis en la malgranda, sed bela litva urbo Kretinga. La solena malfermo okazis je la unua de aŭgusto. Super la enirejo de la Argikultura Teknika Lernejo estis pendigitaj la ŝtataj flagoj de Sovetunio, Latvio, Litovio, Estonio kaj la verda flago de la esperantistoj. Pli ol 300 esperantistoj el dek respublikoj de Sovetunio plenis la aŭlon de la Teknika Lernejo. La solenan kunvenon malfermis la prezidantino de la Komitato por Preparo de la Tendaro Izabela Oŝiuniene. Kun salutvortoj al la ĉeestantoj turnigis la sekretario de la Regiona Komitato de l' Komunista Partio G. Ĵulpaite, reprezentanto de la Regiona Kleriga Fakoj S. Stropus, esperantistoj el Moskvo, Leningrado, Vilnius kaj aliaj urboj. Post la fermo de la solena kunveno ĉiuj esperantistoj vizitis la tombejon, kie estas enterigitaj la sovetaj militistoj, pereintaj en la bataloj por liberigo de urbo Kretinga el la faŝistaj okupantoj. La esperantistoj metis florkronon al la piedestalo de la monumento.

En la kadroj de la tendaro funkciis somera

universitato, gvidata de profesoro Dages. La esperantistoj aŭskultis prelegojn: „V. I. Lenin en urbo Samara“, „El la historio de Litovio“, „Vojaĝimpresoj eksterlanden per Esperanto“, „La manko de movado — unu el la plej ĉefaj kaŭzoj de malsanoj“ k. a.

Esperantistoj-medicinistoj, ĵurnalistoj, instruistoj organizis fakajn kunvenojn, dum kiuj ili priparolis demandojn pri praktika uzado de Esperanto. Funkciis E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

La esperantistoj ne nur lernis, ili ankaŭ ripozis. Oni aranĝis ekskursojn al la urboj Palanga kaj Klaipeda, kiuj situas sur la bordo de Balta Maro. Preskaŭ ĉiujvespere estis amatoraj artkoncertoj, unu el kiuj estis aranĝita por la loka loĝantaro.

Pupteatro el litova urbo Panevejis prezentis esperantlingve la spektaklon „Porkidoj“.

La 10-an de aŭgusto la tendaro estis fermita kaj la Esperanta flago estis transdonita al reprezentanto de latvaj esperantistoj, kiuj sekvo-tan jaron organizos Esperanto-tendaron.

La loka gazeto „Lumturo“ kelkfoje informis pri la tendaro.

A. Seljankin

ESPERANTO EN SLOVAKIO

En Slovakio Esperanto havas longjaran tradicion — de sia komenco en la unuaj jaroj de ĉi tiu jarcento ĝis la fonda kongreso de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, kiu okazis en pasintjara majo en hotelo „Esperanto“ sub la montaro Altaj Tatroj.

La ŝtataj instancoj de Slovaka Socialisma Respubliko favoras Esperanton kaj subtenas ĝian disvastigadon kaj uzadon. Tio tre klare montriĝis en ĉi tiu jaro — la Internacia Jaro de Edukado. La nuna jaro estas samtempe la 300-a datreveno de la morto de granda pedagogo, instruisto de nacioj, pioniro de la ideo de internacia lingvo kaj aŭtoro de projekto de universala lingvo „Panglottia“ — Ján Amos Komenský — Comenius kaj 250-a datreveno de la naskiĝo de l'fama slovaka astronomo Maximilián Hell, kiun Unesko envicigis en la kalendaron pri datrevenoj de eminentaj personoj.

La esperantistoj en Slovakio kaj la koncernaj ŝtataj institucioj decidis kontribui al la Internacia Jaro de Edukado, digne reprezenti Slovakion en internacia forumo kaj informi la tutmondan publikon pri Ján Amos Komenský kaj Maximilián Hell.

Kiel kontribuajon al la Internacia Jaro de Edukado, omaĝe al Ján Amos Komenský la Slovaka Pedagogia Eldonejo eldonis Esperantan-slovakajn kaj slovakajn-Esperantan vortaron havantan 835 paĝojn, kiu enhavas preskaŭ ĉiujn vortojn de la Plena Vortaro kun la Suplemento. Ĝi estas ĝis nun la plej granda Es-

peranta-slovaka kaj slovaka-Esperanta vortaro, kiu en Slovakio aperis.

Radiostacio Bratislava pretigis novan version de Esperanta radiokurso por komencantoj kaj preparas kurson por progresintoj. Slovaka televido preparas televidkurson de Esperanto, kiu estas tiel farita, ke oni povos ĝin uzi tutmonde.

Slovaka televido preparas ankaŭ Esperantan version de televida dokumentfilmo pri Maximilián Hell. Ĝi estas la unua televidfilmo, per kiu la slovaka televido kaj esperantistoj informis la tutmondan publikon per la helpo de Esperanto pri sia fama samlandano.

Ankaŭ en aliaj regionoj de la kultura vivo la slovakaj esperantistoj estas aktivaj. Ekzemple en la Internacia Esperanta Pupteatra Festivalo en Zagreb pasintjara oktobron la Esperantaj pupteatrinoj de la Ŝtata Pupteatro el orientslovakia urbo Košice gajnis la plej altan premion „La oran pupon“ kaj ses aliajn premiojn. Per tio ili certigis al si ankaŭ partoprenon en la ĉi-jara Internacia Festivalo, por kiu ili konsciencie prepariĝis.

La Esperantistoj en Slovakio konsideras kiel sian devon esti aktivaj sur la kultura kampo ne nur pro la fakto, ke Esperanto estas grava kultura faktoro, sed ankaŭ pro tio, ke Slovakio havas riĉan kulturen historion, kulturajn valorojn, kaj gefiloj de Slovakio kontribuis jam de malnovaj tempoj al la kultura kresko de la mondo.

Ján Amos Komenský—Comenius naskiĝis en

Moravia (1592). Li estis fidela filo de ĉeĥa nacio, sed liaj antaŭuloj devenis el Slovakio, el la ĉirkaŭaĵo de urbo Trenčín.

En sia verko „Via lucis“ („La vojo de la lumo“) li klare formulis, al kiu servu kaj kiel aspektu la nova internacia lingvo. Li skribas: „Unue, la universala lingvo devas esti la plej riĉa el ĉiuj, ĉiuflanke sufiĉa por ke ĝi adekvate esprimu ĉiujn aĵojn kaj facile esprimu ankaŭ ĉiujn imagojn de la menso, fine, kaj tio estas ĉefafero, la universala lingvo devas esti universala kuracilo kontraŭ konfuzo de nocioj. El tio rezultas la konkludo, ke . . . ne ekzistas pli efika rimedo ol fari lingvon novan, kiu estus kompare kun la konataj lingvoj 1) pli facila — por ke oni povu ĝin lerni sen tempoperdo, 2) pli plaĉa — por ke oni ĝoje lernu kaj finlernu ĝin, 3) pli perfekta — por ke ĝia kono helpu al kompreno de ĉiu afero.“

Komensky klopodis efektiviĝi ĉi tiujn principojn en la verko „Panglottia“ kun aldono „Novae harmonicae linguae tentamen primum“. Ĝi estas la kvina parto de la granda filozofia, scienca kaj eduka verko „De rerum humanarum emandatione consultatio catholica“.

El la strukturo de „Panglottia“ klare montriĝas, ke Komensky klopodis krei lingvon perfektan, simplan, absolute regulan, sen esceptoj, por ke ĝin povu lerni ankaŭ homo ne tre klera. Do, la samaj principoj, kiujn aplikis Zamenhof en Esperanton. Pri ĉi tiu klopodo de Komensky la tutmonda publiko scias nur malmuton.

Same malmulte oni scias, ke Slovakio donis al la mondo eminentan astronomon Maximilián Hell, kiu jam en la jaro 1769 elkalkulis la distancon de la Suno al la Tero dum la transiro de Venuso trans la suna disko. La plej novaj mezuradoj per helpo de precizaj instrumentoj konfirmis la ĝustecon de liaj kalkuloj.

Hell naskiĝis en 1720 en mezslovakia mineja urbo Banská Štiavnica, kie lia patro estis okupita kiel mineja ĉefingeniero. Maximilián havis 21 gefratojn, kiuj plej grandparte restis en minista profesio. Nur li fariĝis astronomo. Baldaŭ li estis mondkonata. Dana reĝo Kristian VII invitis lin al Skandinavio kaj promesis al li financi sciencon ekspedicion al insulo Vardö, por ke li povu tie observi la transiron de Venuso trans la suna disko. La rezultoj de la observado estis eminentaj. Revenante hejmen tra Finnlando, Hell kun sia asistanto Šajnovič faris pluan sciencon malkovron: la lingvan parencon de finnoj kaj laponoj kun hungaroj.

Pri la vivo kaj laboro de Maximilián Hell detale informas la menciita Esperanta filmo de Slovaka Televido.

Pavel Rosa

*El „Slovakiaj Novaĵoj en Esperanto“
julio/1970*

Pola Radio Gdansk disaŭdigas en Esperanto

La 23-an de oktobro j. k. Pola Radio Gdansk rekomencis disaŭdigi en Esperanto. La disaŭdigoj okazos ĉiun duan vendredon (ekz. en decembro — la 18-an) je la 23,40 horo laŭ Greenwich sur jenaj ondoj: 230, 278, 1322 m. La sekvan tagon la disaŭdigo estos ripetita je la horo 12,30 sur kurt-ondoj 19.8, 30.8, 31.10, 31.40, 41.48, 49 m.

La esperantistoj estas petataj sendi al Radio Gdansk leterojn kun programpropoj kaj salutoj. De tio dependas la sorto de la novaj E-disaŭdigoj. Skribu al:

Radio Gdansk — Wrzeszcz, Esperanto-fako, str. Uphagena 1, Pollando.

E-NOVAĴOJ EL USSR

* En ekspozicio de Centra Muzeo de V. I. Lenin (Moskvo) estis prezentita libro de V. I. Lenin — „Stato kaj revolucio“ — en Esperanto. Tradukis G. Demidjuk, eldonita en Japanio, 1937 j.

* Informoj pri la 55-a E-kongreso en Vieno estis presitaj en la centraj ĵurnaloj „Pravda“ (Moskvo), „Leningradskaja pravda“ kaj en aliaj ĵurnaloj.

* Iĵevskaja Telestudio transdonis en Esperanto salutojn al la loĝantoj de Udmurio de la prezidanto de Aŭstrio Franz Jonas, honora prezidanto de la 55-a E-kongreso, kaj rakonton de la konata ĵurnalisto E. Flejš pri lia korespondado kun esperantistoj de 30 landoj.

* La Dagestana Klubo de Esperantistoj (gvidanto A. Unusov) kun helpo de la Respublika Komitato de VLKSM organizis laborbrigadon por helpi al regionoj de la Respubliko, kiuj eksuferis de tertremo. Ĵ. „Komsomolskaja Pravda“ informas la 28-an de junio: „Studentoj de diversaj specialecoj, unuigintaj per Esperanto, venis helpi al la konstruantoj de Dagestano.“

* En kvin institutoj de Kievo estas organizitaj kursoj por studado de Esperanto. Organizinto de la kursoj estas la bulgara aspiranto Kiril Velkov.

* Aspiranto de Kieva Politeknika Instituto verkis sian disertacion utiligante sciencajn materialojn ankaŭ en Esperanto.

* „Esperanto estas lingvo por la tuta terglobo“ — tian raporton faris sur la ŝipo „Ivan Kadakov“ (Moskvo — Ufa) la konata kieva esperantisto P. P. Vasilĉenko.

* En la distrikta biblioteko de Vorosilovgrad estis organizita E-ekspozicio. En la programoj de la distrikta radio ofte oni donas lokon al esperantistoj.

E. Kiselev

El bulteno „Ligilo“, n-ro 7-8/1970, eldonita de Moskva Internacia E-klubo.



POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

LA PLEJ BELA BIRDIDO

am ankaŭ la birdoj sendadis siajn infanojn por lerni same kiel la homoj. La birdoj havis siajn lernejojn. Tie la birdidoj lernis kiel flugi pli rapide, kiel trovi nutraĵon, kiel fari nestojn — ĉion, kion ili bezonis en la vivo.

Iu hirundino kaj iu kornikino loĝis proksime unu al alia — ili estis najbarinoj. Foje la hirundino vidis, ke la kornikino rapidas ien.

— Kien vi ekhastis tiel, najbarino? — demandis ŝin la hirundino.

— Ho, lasu min, najbarino! — diris maltrankvile la kornikino. — Mi hastas al la lernejo por forporti manĝaĵon al mia kornikido.

— Atendu, najbarino, — ekpetis la hirundino, — venu, por ke mi donu al vi forporti manĝaĵon ankaŭ al mia hirundido — mi havas urĝan laboron kaj mi ne povas forlasi ĝin.

La kornikino konsentis. La hirundino alportis la manĝaĵon kaj donis ĝin al ŝi.

— Sed kiu estas via birdido? — demandis la kornikino. — Mi ne konas ĝin — laŭ kio mi ĝin distingos?

— Ne timu, — respondis la hirundino, vi distingos ĝin. — Rigardu, kiu birdido estas la plej bela, tiu estas la mia!

Ekflugis la kornikino al la lernejo. Forpasis sufiĉe da tempo kaj ŝi denove revenis. La hirundino renkontis ŝin kaj demandis:

— Nu, kio okazis, fratino mia? Ĉu vi donis la manĝaĵon al mia hirundido?

— Ho, fratino hirundino, mi ne scias, kion diri al vi — respondis maltrankvile la kornikino. — Aŭskultu, kio okazis: mi iris en la lernejon, finnutris mian kornikidon kaj serĉis vian hirundidon. Ja vi diris al mi serĉi la plej belan birdidon kaj doni la manĝaĵon al ĝi. Mi rigardadis, fratino mia, rigardadis, finrigardadis ĉiujn birdidojn, sed pli belan ol la mia mi ne vidis. Kaj jen mi decidis doni al ĝi ankaŭ vian manĝaĵon. . .

*El la bulgura
D. Haĝ*

„SCIENCA REVUO“ DUDEKJARA

„Scienca Revuo“, la konata periodaĵo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, eniras sian dudekunuan jaron. Tio estas grava evento por la tutmonda Esperanto-movado. Jam dudek jarojn „Scienca Revuo“ servas ne nur kiel ligilo inter la esperantistoj sciencistoj kaj kiel ties forumo, sed ankaŭ kiel elokventa pruvo, ke la Internacia Lingvo Esperanto estas taŭga lingva instrumento por scienca komunikado. Malferminte siajn paĝojn por ĉiuj aferoj de la scienco, „Scienca Revuo“ konvinke montaris, ke ne ekzistas scienca branĉo, kies problemoj ne povas esti prezentitaj per Esperanto.

La meritoj de la revuo ne finiĝas per tio. La neceso prezenti la evoluantan sciencon, kiu

konstante kreas novajn nociojn kaj postulas novajn terminojn, transformis la revuon en veran laboratorion por Esperanto-sciencia termi, naro. Hodiaŭ „Scienca Revuo“, kolektinte ĉirkaŭ si multnombrajn elstarajn kunlaborantojn, prezentas aŭtoritatan periodan organon de la tutmonda esperantistaro. Pri tio konvinke atestas la fakto, ke ekde la nuna — 1970-a jaro ĝi aperadas ne kiel ĝis nun kvarfoje jare, sed sesfoje kun minimume 32 paĝoj en ĉiu numero.

Al la redakta komitato frunte kun la senlaca ĉefa redaktoro prof. Bojidar Popoviĉ kaj al multnombraj kunlaborantoj de la revuo ni deziras pluajn sukcesojn!

Ljubomir Miĥajlov.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Dimitr JDRAKOV, Venelin MITEV, Dimitr MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tei. 83-26-82

Nova gramofondisko kun modernaj kanzonoj en Esperanto

Ĝus aperis la unua gramofondisko kun kvar modernaj kanzonoj en plenumo de la Esperantista Muzik-Ensemblo „Muzilo“ el Vroclavo. Se la disko rapide disvastiĝos, oni baldaŭ produktos alian en plenumo de la sama ensemblo.

Prezo de la mikrokanela disko (45 r/m, 17 cm) estas unu usona dolaro aŭ egalvaloro. Oni povas aĉeti la diskon rekte ĉe la:

Eksporta kaj Importa Entrepreno „Ars Polona“, Varsovio, str. Krakowskie Przedmieście 7, Pollando.

La disko estas ankaŭ aĉetebla en:

Pola Kulturcentro, Sofia, bulv. Ruski 12:

Esperantistoj el ĉiuj socialismaj landoj direktu mendleterojn al sialandaj importaj entreprenoj okupiĝantaj pri importado kaj eksportado de libroj kaj diskoj. Se koncerna importa entrepreno ricevos multajn leterojn kun demandoj pri la disko de la Muzik-Ensemblo „Muzilo“, tiam ĝi certe tuj venigos pli grandan kvanton de la disko, kiu estos poste aĉetebla en ĉiuj diskovendejoj en la tuta lando. Konsideru, ke tiam aĉetos ĝin ankaŭ neesperantistoj, kiuj eble dank' al tio ekinteresiĝos pri Esperanto. Jen la adreso de la importa entrepreno en Bulgario:

„Hemus“, Sofia, bulv. Ruski 9.

Klamaniere akiri sonbendojn kun esperantlingvaj kanzonoj

Sonbendoj kun Esperantlingvaj kanzonoj en plenumo de la Muzik-Ensemblo „Muzilo“ oni povas aĉeti de: Redakcia Nagraĵi i Przegran Fonieczno-Wizyjnych Polskiego Radia i Telewizji (Redakcio de Surbendigoj kaj Kopiadoj Foniaj-Vidaj de Pola Radio kaj Televido), Warszawa, ul. Woronicza 17 p. 212, Pollando.

En la mendo nepre menci, ĉu interesas vin unutraka, du-traka aŭ kvar-traka surbendigo kaj kia estu la rapideco de la surbendigo (4,75 cm/sek, 9,5 cm/sek, 19 cm/sek aŭ 38 cm/sek). Menci ankaŭ por kiu celo vi bezonas la bendon (ekz. por klubaj vesperoj, por privata uzo ktp.). Ĉe la sama adreso vi povas ankaŭ aĉeti 20-minutan programon pri la Ensemblo „Muzilo“ (kanzonoj kaj intervjuo) disaŭdigitan la 6-an de junio. Tiu programo krom en pola kaj Esperanta versioj estas prilaborita ankaŭ en aliaj lingvoj, en kiuj disaŭdigas Pola Radio, menci do version, kiun vi preferus ricevi por eluzi en priesperanta informado en via urbo.

La Esperanta kanzono en la eteron!

La Muzik-Ensemblo „Muzilo“ surbendigas multajn kanzonojn en Esperanto por la Pola Radio kaj Televido. Tiuj kanzonoj estas ofte aŭdigataj en diversaj programoj, enlandaj kaj eksterlandaj, de Pola Radio kaj Televido. Ekzistas ebleco, ke ili estu aŭdigataj ankaŭ de alilandaj radio- kaj televid-stacioj laŭ la ekzistanta interkonsento pri interŝanĝo de programoj inter radiostacioj de diversaj landoj. Necesas nur, ke koncerna radiostacio ricevu multajn leterojn kun petoj, ke oni prezentu la polan Muzik-Ensemblon „Muzilo“ el Vroclavo. Ni petas do, ke ĉiu esperantisto skribu en sia nacia lingvo minimume du leterojn — unu al la centra radiostacio kaj duan al la centra televid-stacio. Estus bone, se oni sendos leterojn ankaŭ al lokaj radio kaj televidstacioj.

S-ano H. Leubner el Pirna (GDR) jam skribis al Radio Berlin, ke ĝi disaŭdigu kanzonojn en plenumo de la Muzik-Ensemblo „Muzilo“ kaj ricevis favoran respondon.

Kanzonoj de „Muzilo“ en eksterlandaj programoj de Pola Radio

La Eksterlanda Fakto de Pola Radio dissendas programon en 13 lingvoj. Bonvolu skribi nacilingve al koncernaj redakcioj kun peto, ke oni pli ofte aŭdigadu Esperantajn kanzonojn en plenumo de la Muzik-Ensemblo „Muzilo“. Ĉiuj redakcioj dissendas „koncertojn kun bondeziroj“. Vi povas do senpage sendi bondezirojn al via amiko (korespondanto) akompanatajn de iu kanzono. La Eksterlanda Fakto de Pola Radio posedas surbendigojn de jenaj kanzonoj: Jen la Tero, Al mi plu diru, Estis inter ni nenio, Bonveno, De l' arboj la verdaj kaj Estis bela la somer'.

Skribante al koncerna redakcio (se eblas en nacia lingvo), adresu la leteron jene:

Pola Radio, Programo por Eksterlando, Redakcio, Varsovio, poŝtkesto 46, Pollando.

Ekzistas la jenaj redakcioj: Esperanta, Dana, Sveda, Finna, Angla, Franca, Germana, Itala, Rusa, Hispana, Ĉeĥoslovaka.

Ekzemple, esperantisto loĝanta en Bulgario povas sendi bondezirojn al sia itala korespondanto pere de Itala Redakcio de Pola Radio. Pola Radio perletere informos vian korespondanton pri la dato, nomo kaj ondlongoj de la transsendotaj bondeziroj.

Ni restas kun amikaj salutoj:

**LA ESPERANTISTA MUZIK-ENSEMBLO
„MUZILO“**

**Wroclaw — 17, poŝtkesto 16, ul. Dubois 3,
POLLANDO**